

O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.

NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

ANO 41 — N.º 109 - 112 (395 - 398)

Telegrafa adreso: **ESPERANTOLIGO**

JANEIRO — ABRIL 1947

Diretor: A. Caetano Coutinho
Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues
Telefone — 42-4357

Administração e redação:
Praça da República, 54-sob.
Rio de Janeiro — Brasil

Gratuito para os sócios da Liga
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondkuponoj.

La 4a. Argentina Kongreso de Esperanto

Post sep-hora flugado nia monstra aviadilo surterigis sur la Kampon Moron, en Buenos Aires, kaj ni devis paciencie elteni, ke la argentinaj doganistoj esploru niajn valizojn. Tra vitra pordo jam salutis nin grupo da samideanoj, kiuj malgraŭ la pluvado nin atendis en la aviadilejo.

Estis tuta deko da kleraj gesamideanoj gajaj, babilemaj. Sur la pordo de la Doganejo aperis afiŝo pri la Kongreso. Granda omnibuso nin atendis kaj kondukis al la mirinda urbejo. Neniu el ni sin sentis en fremda lando, ĉar ni ja estis en Esperantujo, kie ĉiuj alparolis nin nur en la komuna lingvo de la esperantistoj kaj en plena intimeco jam ŝercis, diris spritaĵojn pri diversaj temoj, iom mokis la fotografiston de la gazetaro, kiu fidele plenumis sian devon sub la pluvo.

En Argentino loĝas kaj laboras multaj eminentaj esperantistoj venintaj el diversaj patrujoj, ne nur enlandanoj; tial la Kongreso ne ŝajnis nacia, sed tute internacia. Apud mi ĉarma rusino Sonja parolas kun slava akcento; sur la alia flanko sidis ŝia germana edzo, ankaŭ lerta esperantisto; jen Goodes, klera anglo el Rosario, kies akcenton oni tuj rimarkas. Ĉina samideano ofte petas la parolon por diskuti en malrapida, kantata Esperanto; juna ĉeĥo ĉiam montras al mi tradukojn, kiujn li mem faris el sia nacia lingvo en Esperanton. Mi loĝas ĉe Sekelj, jugoslavo, kaj tagmanĝas ĉe rusa judino tre afabla, la bopatrino de Hess. En la kongresejo aperas brazilanoj, argentinanoj, hispanoj, urugvajanoj, italo, ĉino, anglo, germano, ruso, ĉeĥo, polo. Tuta internacia mondo babilanta en Esperanto, klare, korekte, elegante, sed

preskaŭ ĉiam oni povas rimarki naciajn akcentojn.

La malferma Kunsido en Casa del Teatro estas impona: grandega salono tute plena. Prezidas Eŭgeno Iglesias kaj anoncas la Argentinan Nacian Himnon, kiun ĉiuj kantas majeste, starantaj. Kia bela kanto! Ĝi temas pri libereco, pri la falo de rompitaĵoj... Post la Argentina Himno, la tuta ĉeestantaro kantis La Esperon. Ja, ĉiuj kantis, ne nur la kongresanoj. Ĉiuj delegitoj prezentis salutojn al la Kongreso kaj la alilandaj Delegitaroj salutis ankaŭ la argentinan popolon. Bela festo estis la Soĥena Malferma Kunsido de la Kongreso.

La laborkunsidoj en **Circulo de la Prensa** estis tre viglaj. Ardaĵ diskutoj montris la kapablecon de la argentinaj samideanoj por paroladi en la lingvo. La movado estas tute demokrata. Ĉiu detalo estas longe diskutita kaj fine voĉdonado decidas la aferon.

La "Viva Gazeto" estis longa kaj vere internacia. En ĝi partoprenis: brazilano, Braga; anglo, Goodes; du argentinanoj, Iglesias kaj Hess; urugvajano, Cao; jugoslavo, Sekelj.

La teatraĵo en la Klubo "**Honor y Patria**" estis granda sukceso. Oni prezentis interesan programon de Marionetoj kaj kantis belajn popolkantojn de Brazilo, "A Casa do Caboclo", de Argentino, Grekujo kaj aliaj landoj en naciaj lingvoj kaj plurajn kantojn en Esperanto. Fine ĉiuj starante kantis la himnon "La Espero".

Unu el la deziresprimoj de la Kongreso estis, ke oni esploru la eblecon efektiviĝi en Rio de Janeiro, post du jaroj, Tutamerikan Kongreson de Es-

peranto por pritrakti amerikajn problemojn pri la disvastigo de la lingvo. Pri tiu temo oportune B.L.E. devos decidi.

La Bankedo en la restoracio de la Klubo "**Honor y Patria**" kunvenigis la kongresanojn en du fakojn: viandmanĝantoj kaj vegetaranoj. La salonego estis tute plena kaj regis ĝojo. La kelneroj ne parolas Esperanton, sed tio ne gravas, ĉar estas sufiĉe multe da lertaj interpretistoj por helpi nin.

La argentinaj samideanoj estis plej afablaj al ni, alilandaj delegitoj, kaj faris adiaŭnan feston dediĉitan al la reprezentanto de Brazilo Ligo Esperantista. Ni ŝuldas al ili tutkoran dankon.

La katolikaj esperantistoj invitis nin al Meso en Kapelo San Roque. La popolo kantis diversajn religiajn himnojn en Esperanto dum la Meso kaj Pastro Juan S. Casali predikis tre bele en Esperanto pri la Reviviĝo de Jesuo, laŭ Sankta Johano, ĉapitroj 20a kaj 21a.

La Katolika Esperanto-Movado en Argentino estas granda kaj forta. Ĝin gvidas la juna kuracisto D-ro Quiña González kaj pluraj eminentaj pastroj. Estas dezirinde, ke tiu movado ĉiam pli kaj pli prosperu, ĉar nur ĝi povos helpi la argentinan Registaron kompreni la neŭtralecon de nia movado. Tia kompreno ĝis nun ne ekzistas en la granda argentina Nacio. Tie la Registaro rigardas Esperanton kiel ian strangan politikan internacian movadon apenaŭ tolereblan. En Brazilo kaj multaj aliaj landoj la neŭtraleco de la Esperantomovado estas perfekte komprenata kaj la lingvo estas uzata por la plej diversaj celoj privataj aŭ oficialaj.

ALIGHU AL LA 11-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Dum kaj post la Kongreso ni diskutis la neceson de bonaj lernolibroj kaj vortaroj por hispanlingvanoj kaj perletere pridemandis la Prezidanton de la Brazila Spiritisma Federacio, S-ro A. Wantuil de Freitas, ĉu la eldonejo de tiu Federacio, kiu jam eldonis du lernolibrojn por hispanlingvanoj, povos eldoni ankaŭ la vortarojn. Lia respondo alvenis ĝustatempe por esti montrata al la gvidantoj de la argentina movado. Li respondis, ke B.S.F. kun plezuro eldonos la du vortarojn. Ĝis nun la originaloj ne estas pretaj, sed en Argentino kaj Urugvajo estas lertaj esperantistoj, kiuj povos kompili perfektajn vortarojn en mallonga tempo.

Resume, la Kongreso bone sukcesis, kaj al mi ŝajnas, ke nia vojaĝo al tiuj najbaraj landoj ne estis nur agrabla turisma plezuro, sed iomete helpas la disvastigon de Esperanto en la Nova Mondo.

Ni brazilaj esperantistoj devas kiel eble plej multe kunlabori kun niaj samideanoj de Hispanameriko, ĉar nia movado enlanda estas pli malnova kaj jam solvis la fundamentajn problemojn de eldonado de libroj kaj oficiala agnosko. Niaj asocioj jam ricevas subvenciojn de privataj asocioj, de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, de regis-

estas ja miraklo de energio kaj laboremo. Ni kunlaboru kun ili per lernolibroj kaj ili havos la plej rimarkindajn sukcesojn en la tutmonda Esperanto-movado.

Ĝis nun ni zorgis nur pri la enlanda propagando, de nun ni pensu amerikskale dum ni ne povas pensi mondscale. La afero ja estas komuna de ĉiuj, sen landlimoj. Ĉiu venko de Esperanto apartenas egale al ĉiuj esperantistoj en la mondo, ne al iu difinita loko. Ni laboru por tutamerika esperantismo, ne nur por brazila esperantismo.

Post la Kongreso mi vojaĝis al Urugvajo por viziti la tieajn samideanojn. Vere afablaj kaj kleraj homoj, ili ĉiam estis kun mi dum vizitoj kaj promenadoj. Mi vizitis la sidejon kaj konstatas, ke ili havas bonan bibliotekon en Esperanto, sed same kiel en Argentino, al ili mankas vortaroj kaj lernolibroj por grandskala propagando de la lingvo.

En Montevideo ekzistas bonega Instituto Brazilia-Urugvaja, kiu instruas la portugalan lingvon kaj brazilan literaturon al la urugvaja junularo. Tie nia nacia lingvo estas konata de multaj kleraj junuloj kaj ni iomete povas helpi la disvastigon de Esperanto per vortaroj kaj lernolibroj brazilaj. Pri tiu temo mi interkonsentis kun la klera juna espe-



Malferma kunsido de la 4-A Argentina Kongreso — La Estraro

taroj de la Respubliko, de ŝtatoj kaj urboj. Esperanto en Brazilo jam estas publika afero, dum en tiuj landoj ĝi restas en fermitaj rondoj de idealistoj. Bonegaj propagandistoj kaj lertaj instruistoj ekzistas en Argentino kaj Urugvajo, sed ili ne trovas la necesan apogon de la registaroj kaj ne posedas sufiĉe bonajn lernolibrojn. La sukceso, kiun ili atingas en tiaj malfavoraj cirkonstancoj

rantisto S-ro Victor Luis Cao kaj jam sendis al li kelkajn lernolibrojn.

La 4a Argentina Kongreso de Esperanto kunvenigis plurajn samideanojn de Argentino, Brazilo, Urugvajo por komuna agado kaj reciproka interhelpo, tial ĝi komencis floran epokon por nia Sudamerika movado.

Antaŭ ol fini tiun ĉi artikolon, mi

(Daŭrigota sur paĝo 8-A)

IN MEMORIAM

SEBASTIÃO ALMEIDA OLIVEIRA

Ao percorremos displicentemente as colunas dos jornais da semana, tivemos dolorosa surpresa ao depararmos com a notícia do desaparecimento, aos setenta e cinco anos de idade, de nosso prezado samideano Alberto Couto Fernandes, presidente perpétuo da Liga Esperantista Brasileira e um dos mais denodados propugnadores pelo triunfo dos ideais de Zamenhof em plagas sul-americanas.

Surpresa, sim, porque já nos habituáramos à sua presença constante e dele havíamos recebido, dias antes, delicado cartão escrito, como de praxe, no idioma auxiliar e num cursivo firme de seu próprio punho. Aliás, desde que, por iniciativa de outro não menos dedicado amigo, Ismael Gomes Braga, fomos iniciados no estudo dessa língua — e data isso de alguns lustros apenas — começamos desde logo a manter correspondência com o ilustrado engenheiro patricio que, como todos sabem, foi um dos fundadores da *Brazila Liga Esperantista*, em 1907, e seu presidente há quase meio século.

E, durante os anos de nosso aprendizado, quando, por acaso, iam esmorecendo na faina perquiridora, lá vinha seu cartãozinho encorajador levando-nos a prosseguir no conhecimento das obras básicas e, com ele, brochuras, revistas e publicações de várias espécies vinham ter às nossas mãos, providas informações acêrca do movimento esperantista neste e noutros continentes.

Ainda recentemente, tendo escrito um artigo em esperanto, para uma revista suíça, tivemos a grata satisfação de vê-lo irradiado pela Rádio Inconfidência Mineira, graças aos bons ofícios do incançável obreiro que à nossa revelia tudo dispôs.

Cumpramos aqui seu trabalho assíduo sustentando a todo custo, mesmo com os precalços da guerra que faz sobossobrar grandes iniciativas, o mensário "Brasil Esperantista", que vem mantendo acesa, Brasil afora, a chama sagrada de nosso ideal de fraternidade, e sua polimórfica atividade no organizar e presidir clubes e congressos, na difusão do esperanto pelo rádio e sua oficialização nos correios e telégrafos além de ulteriores conquistas de grande repercussão. Dignas de elogio caloroso são as magníficas traduções que fazia, para o idioma neutro, dos principais artigos inseridos na preciosa revista da Sociedade de Geografia do Rio de Janeiro, entidade a que nos honramos de pertencer e onde prestou êle, desde longa data, os mais assinalados serviços.

Assim, com a morte desse venerando pioneiro, perde o nosso movimento um de seus maiores propagandistas, porquanto êle era, na feliz expressão de seu companheiro de tertúlias, "a máquina de coser silenciosa" e, sem alarde ou jactância, fez pelo Esperanto um trabalho paciente, metódico e pertinaz, sem grandes arroubos de entusiasmo, mas, também, sem desfalecimentos ou tibiézas.

Que seu exemplo frutifique entre nós e novos adeptos surjam, animados do mesmo propósito e ideal, para que possamos um dia realizar as proféticas palavras do imortal criador da língua internacional:

Sur neutrala lingva fundamento,
Kompreneante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian!

(Ext. de "Folha de Rio Preto", de 3-5-46).

Os participios passados em Esperanto

Um dos escolhos que encontra o estudante da gramática do Esperanto é o emprêgo exato das formas verbais dos participios em *ata* e *ita*, da voz passiva. Foi êste um dos capítulos a que dei particular atenção, mormente depois de ver mal empregadas essas terminações, pois em desacôrdo com o uso da autoridade suprema, o próprio criador da língua internacional. Tive a paciência de reler algumas das obras do mestre, assinalando na margem as ocorrências dêsses participios, conjugado cada um com o pseudo-auxiliar "*esti*"; em seguida, classifiquei essas formas em algumas categorias, para daí fazer um "sistema", com o fim de orientação própria e dos "samideanoj".

O grupamento que mais irrita a quem tenha um pouco de lógica — e esta é a pedra angular do Esperanto — é o "*estis -ata*", para exprimir pretérito passivo, sob o falso argumento de que "*estis -ita*" é, e não pode deixar de ser... mais-que-perfeito. Em "Lingva Kritiko", bem feito suplemento do "Heroldo de Esperanto", tive a honra de ver publicado um estudo que fiz do então chamado "problema"; é de louvar a nobreza do seu redator-chefe, cuja opinião é absolutamente antagônica da do autor mesmo do idioma, o qual acompanho *in totum*. Desvaneço-me, também, de que êsse artigo haja contribuído para o capítulo da "Plena Gramatiko", dos ilustres srs. K. Kalocsay e G. Waringhien, que lhe aproveitaram vários exemplos, mas, infelizmente, sem ter entendido o "problema", fazem aí asserções inteiramente falsas.

Ensina-se e insiste-se, ainda hoje, que o verbo "*esti*" é "auxiliar" do verbo "principal" no participio: é mera transplantação das línguas nacionais para a língua internacional. Se, porém, notarmos que a êste propósito o próprio Zamenhof nada disse, haveremos de encarar as formas verbais "compostas" sob ponto de vista diferente. No "Fundamento" encontramos, depois da apresentação dos participios, das vozes ativa e passiva, o seguinte: "Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo *esti* kaj participo pasiva de la bezonata verbo" (regra 6). Observemos: 1) diz, tão somente, que as formas "compostas" são constituídas do verbo *esti* e do verbo em causa; 2) não diz que *esti* seja "auxiliar", i. e. um verbo de menor importância que o que chamamos "principal",

nem ao "*bezonata*" denomina, p. ex., "*precipa*"; 3) nenhuma palavra sôbre as formas "compostas" na voz ativa; por êste 3º item, não saberíamos dizer o mais-que-perfeito, nem o futuro anterior, nem outra forma "composta", dessa voz: dizemo-los simplesmente pelos próprios significados do verbo *esti* nos seus respectivos tempos.

Daí concluímos que o verbo *esti* continua com a sua significação plena, ainda quando "compondo" com outro verbo (ou consigo mesmo) a expressão verbal desejada. Por isto mesmo, na voz ativa Zamenhof ainda escolheu o mesmo verbo *esti*, quando, p. ex., em português, empregamos o verbo "ter" ou "haver". Em nossa língua nacional, sim, podemos e devemos dizer que o verbo "ter" (ou "haver") é "auxiliar", pois muda completamente de significação, só tendo sentido o conjunto do tempo composto. Mas, ainda em nosso vernáculo empregamos, por vêzes, o verbo "ser", em lugar de "ter" ou de "haver", nestes casos, p. ex.: "F. já é morto há dez anos"; "V. ainda não era nascido nesse tempo"; "Já eram passadas algumas horas"; "Serão corridas muitas águas até êsse dia", etc.

Nestes exemplos do português vemos o estado do sujeito; se os passássemos para o Esperanto, o verbo *esti* significaria "troviĝi", p. ex.: "F. estas mortinta jam de dek jaroj" quer dizer: "F. troviĝas mortinta..."; "V. ankoraŭ ne estis naskita..." significa: "V. ankoraŭ ne troviĝis naskita..."; e assim os demais.

A grande falha do raciocínio dos que "*querem*, à viva fôrça, que a combinação "*estis-ita*" tenha o significado exclusivo do chamado "mais-que-perfeito" reside no seguinte: "*estis*", dizem, equivale a "troviĝis", e "*ita*" corresponde a ação passada, pretérita naquele momento assinalado pela forma passada "*estis*"; como naquele momento já a ação havia terminado, já era terminada, concluem "lindamente" que a ação fôra anterior àquele instante! Compreendem que "*estis*" iguala "troviĝis", mas insinuam um "jam antaŭe", que não tem nenhuma cabida, e então escrevem: "*Sinjoro frapis, kaj la pordo estis malfermata*" (!), porque, dizem, se disséssemos "la pordo estis malfermita", cairíamos no absurdo de que, estando a porta aberta, alguém precisasse de bater para entrar (entre parênteses: não é rara esta conveniência...). Por que,

perguntamos por nossa vez, não vêem um "*de tiam*", i. e. "*desde êsse momento*", só enxergando um "*antaŭ tiam*"? Porque, respondem, "*estis -ita*" é mais-que-perfeito; não, retrucamos, o inverso é que é certo: o "mais-que-perfeito" só se pode dizer, na passiva, com "*estis -ita*", mas esta combinação não se emprega só para aquêle tempo!

Não dispondo de muito espaço, ofereço aqui um bom exemplo, em tempos futuro e pretérito.

Suponhamos que um copo vai ser cheio d'água; quando cair a última gôta necessária, o copo estará cheio, dizendo o Esperanto: "*estos plena*". Notemos, de logo, que êste "*plena*" é "*plenigita*", com a última gôta. Podemos, pois, dizer: "Per la lasta guto la glaso estos plena" ou "... estos plenigita", i. e. "troviĝos plena" ou "troviĝos plenigita". Ninguém dirá que "antes da última gôta o copo já estará cheio"; o copo só se encontrará cheio justamente ao cair a última gôta. Cumpre, entretanto — o que é da mais alta importância, que "os outros" não percebem (porque não querem) — verificar que o copo, ao ser cheio, i. e. ao receber a água, vai mudando de estado, até atingir o estado final, para o qual transitará com a última gôta, encontrando-se, então, e só desde então, no estado resultante da nossa ação, da ação que êle ia sofrendo. O atingir um novo estado implica uma transição; e no mesmo momento da transição começa o novo estado. Ser-nos-á, por conseguinte, indiferente dizer que com a última gôta (repare-se "*com*", e não "*depois*"!) o copo "*passará a cheio*" ou que o copo "*se encontrará cheio*". Portanto, "*estos plena*" tem dois significados: 1) tornar-se-á cheio; 2) achar-se-á cheio. Substituindo o adjetivo "*plena*" pelo participio do verbo "*plenigi*", só teremos, evidentemente, um participio, que, forçoso é concluir, só pode terminar em *ita*, conforme vimos.

E' fácil verificar que não poderíamos dizer: "La glaso estos plenigata per la lasta guto", não só porque "*plenigata*" não exprime que o copo esteja, então, cheio, como teríamos empregado a terminação "*ata*" para acompanhar a série de transições por que passara o estado do copo ao receber gotas sucessivas. Como regra, podemos dizer: uma transição única exprimimos por *ita*; uma série, por *ata*, pois entendemos a "soma" de vários "*ita*" como igual a "*ata*".

Se ficou bem claro e aceito êste

raciocínio para a forma futura, o mesmo felizmente se dará para a pretérita, o grande cavalo de batalha dos claudicantes. Dizemos: "Per la lasta gutu la glaso estis plena". Já podemos interpretar "iĝis plena" ou "troviĝis plena", i. e. "ficou" ou "achou-se" cheio, **desde então: a transição e o novo estado coincidem**. Penso que não precisaria de maior esforço para concluir que a terminação do participio **só pode ser "ita"**. Logo: "Per la lasta gutu la glaso estis pleniĝita". Não tenho a menor dúvida de que "os outros" diriam "...estis pleniĝita": pesem-se as opiniões dos dois lados.

Se nos permitem, voltamos à frase: "Sinjoro frapis, kaj la pordo estis malfermata". Perguntamos: está certa? Não pode estar: 1.º, porque não vemos a **transição final** de porta fechada para porta aberta; 2.º, porque não teremos **afinal** uma porta no tal estado em que desejamos que ela esteja e que temos em mente: **definitivamente** aberta. Logo "estis malfermita" não padece dúvida.

Os que entendem que "ita" implica, necessariamente, estado **anterior** ao momento a que se refere "estis" têm, com efeito, estranho raciocínio: consideram a forma "estis -ita" isolada e, ainda, fazem uma inversão das frases coordenadas. Ora, insta não esquecer que as palavras valem na frase onde se encontram, e as frases, nos períodos; com vocábulos ou frases a esmo não se pode raciocinar, nem formar sistema.

Voltemos, pois. Consideram isoladamente a frase: "La pordo estis malfermita", sendo natural que entendam: "A porta **estava aberta**" (estis=troviĝis); daí lhes vem ar epugnância pela terminação "ita". Ou, então, invertem: "La pordo estis malfermita kaj la sinjoro frapis": é também absurdo. Se, entretanto, seguirmos a série de ocorrências daquele momento, vemos: uma porta que **estava fechada**, um senhor que **bateu**, uma porta que **foi aberta**: onde o absurdo? Teríamos, em resumo: "pordo estis fermita, sinjoro frapis, pordo estis malfermita". Horror! — exclamam do outro lado. Nada disso — respondemos: "pordo troviĝis (tiam) fermita, sinjoro (tiam) frapis, pordo iĝis (tiam) malfermita" (ou "pordo troviĝis (de tiam) malfermita"). O primeiro "troviĝis (tiam)" também pode ser: "iĝis antaŭ tiam", i. e. a porta **havia sido fechada antes** daquele instante"; de modo que a **anterioridade** reside na **primeira** oração, e não na **última**, como querem os partidários de "estis -ata".

Continuaremos, se possível.

Porto Carreiro Neto

BIBLIOGRAFIO

VIVO VOKAS — DE STELLAN ENGHOLM

Stelo-Libro Vol. IV. Eldona Societo Esperanto. s.p.r. Fako 698, Stockholm 1, Svedujo.

Tiu libro estas kvazaŭ daŭrigo de alia verko de la sama aŭtoro: "Infanoj en Toronto", partoj I kaj II, en du volumoj. Mi konas nur la unuan parton, kaj ĝia legado multe ĉarmis min.

"Vivo vokas" entenas la samajn personojn kiuj, ankoraŭ infanoj en la unua libro, jam fariĝis gejunuloj, kaj iujn aliajn.

Toronto estas vilaĝo en la meza parto de Svedujo, posedanta uzinojn por ferindustrio.

Oni admiras la simplan kaj korektan stilon de Engholm, priskribante tute nature la sinsektan familian vivadon de la Torentanoj.

Unu el la junuloj forlasis sian laboran oficon, kaj iris batali en Hispanujo, dum ĝia interna milito. La lastaj paĝoj de la verko montras lian revenon, tute seniluziita.

Jen kelkaj diroj liaj:

"Ĉu homoj? Ho ne! En milito ili estas nur amaso de viando vivanta kaj moviĝanta, kaj viandoĉifonoj forŝiritaj el la ankoraŭ vivanta amaso."

"Sed plej terura en tiu afero estas, ke ĝi ŝajnas preskaŭ neevitebla. Post la fino en Hispanujo venos certe aliaj aferoj, multe pli grandiozaj. Malmultaj homoj sufiĉas por krei malpacon kiu povas detrui tutan mondparton, precipe se ili havas potencon. Ŝajne estas vero en tio, kion ni lernis en la Kristana instruo en la lernejo: Ke en la homoj estas malbono, kaj pro la malbono estiĝas grandaj malfeliĉoj. Terura estas tiu mortigado. Kaj tamen, kion fari, se venos potencaĵuloj por subpremi nin?"

"La mondo estas malbona kaj malbela rilate al granda parto de la homaj faroj. Kaj tamen la vivo estas bela kaj plena de ĝojo. Estas kvazaŭ mi interne aŭdos mirindan kanton, kiu donus ĝojon kaj agordon al mia vivo. Sekvi la voĉon en sia interno kaj la grandan instruon, tio sufiĉas por doni sencon al nia vivo".

Rekomendinda legado estas tiu verko al niaj samideanoj.

KOTINJU

32a. Universala Kongreso

La 32-a Kongreso okazos de la 26a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto, en ĉefurbo Bern, Svisujo. La Svisa Registaro rajtigas sian Vic-Prezidanto S-ro Enrico Celio, ministro de la Federacia Poŝt-kaj Fervoj — departemento estiĝi la Honora Prezidanto de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto.

La Registaro transdonis sian plej koran deziron por la efektiviĝo de la Kongreso. Dum la solena malfermo de la Kongreso la 27an de Julio, verŝajne la federala konsilanto S-ro Celio salutos la Kongreson en la nomo de la Svisa Registaro.

La Loka Kongreso Komitato anoncas, ke la kosto de loĝejo kaj manĝaĵo

estas de sv. fr. 85 ĝis sv. fr. 205 por la sep tagoj.

Oni ankaŭ faras arauĝojn por belaj ekskursoj, k. t. p. La programo kaj ĉiuj detaloj pri la ekskursoj aperis en la unua numero de la Kongresa gazeto "Svislando vokas vin" (senpage al ĉiuj petantoj). Adreso de la L. K. K. Sekretariejo, 32a Universala Kongreso de Esperanto, Bundesgasse 20, Bern, Svisujo.

Ĝis 11-1-1947 aliĝis kaj pagis la kongreskotizon 538 personoj el 25 landoj, pliaj ĉ. 170 personoj kiuj klopodas por ricevi la permeson pagi la neceson al la L. K. K., kaj tiele havi la eblecon ankaŭ aliĝi.

Ĉiu kongresano ricevos de la Svisaj Ambasadorejoj aŭ Konsulejoj en eksterlando senpagan vizon al Svisujo, montrante la Kongresan Karton.

Nekrologo

Prof. Raul Leitão da Cunha

La 6an de Marto trafis nin la malĝojiga sciigo pri la neatendita morto de la klera kuracisto, profesoro Raul Leitão da Cunha.

Ankoraŭ junulo, post sia doktoriĝo li fariĝis profesoro ĉe la Medicina Fakultato de Rio de Janeiro, rango juste konkerita per serioza ekzameina konkurso. Dum multaj jaroj li estis Direktoro de la Medicina Fakultato, kaj poste Rektoro de la Universitato de de Brazilo. En lastaj tempoj li estis Ministro por Edukado kaj Publika Sanececo, ĝis li emeritiĝis.

Prof. Leitão da Cunha estis favora al nia lingvo, kaj en 1945 faris la solenan malferman paroladon en la Deka Brazila Kongreso de Esperanto.

OZANAM GOMES

Ozanam Gomes mortis la 25an de Marto 1947. Ĉi tiun informon ni ricevis kun sincera bedaŭro. Estis li unu el la plej viglaj defendantoj de nia Verda Stelo en Belo Horizonte, ĉu kiel sekretario de l'Grupo Esperantista "Humberto de Campos" — kiu kune kun aliaj grupoj aliformiĝis en la gravan ESPERANTO KLUBO "AZEREDO COUTINHO", ĉu kiel helpanto por ĉiuj poresperantaj aferoj.

Kvankam malriĉa, li disdonadis al siaj gekonatuloj libretojn en kaj pri Esperanto. Pere de anoj kiel li, la ĉi tiea Spiritisma Junularo propagandis nian Karan Lingvon ĉe la spiritistaro, kaj starigis kurson de Esperanto, kiu rice-

BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS — *Manaus* — La ĉefurbo de ŝtato Amazonas, posedas nun esderantan centron — “Grupo Esperantista Amazonas Verda Stelo”, dank'al klopodoj de la tieaj samideanoj, precipe de S-ro Sebastião Augusto. Jen la unua estraro: Prezidanto, D-ro Hugo M. Tavares; Vic-Prezidanto, Luiz A. Nunes de Melo; 1a Sekretario, Sebastião Augusto; 2a Sekretario, Guanabara Gomes de Araujo; Kasisto, M. Soares; Help-kasisto, Flavio F. da Camara; Bibliotekisto, Ubiratan Lopes; Departemento por propagando, Moisés B. Lindoso.

La unua sidejo de la klubo estas en ĉambro de Legião Brasileira de Assistência kiun ĝentile oferis ties prezidanto Supera Juĝisto André Vidal de Araujo.

PARAIBA — *João Pessoa* — Je la 19a de marto fondiĝis “Tabajara Esperanto-Klubo”, kies estraro estas la jena: Prezidanto, S-ro Geraldo Cantalice Magela; Vic-Prezidanto, José Augusto Romero; 1a Sekretario, S-ro Renato Lemos Diniz; 2a Sekretario, S-ro Raul Vidal de Lemos; Kasisto, Arnaldo Ivo Sales; Bibliotekisto, S-ro Petrônio Jeffly; Direktoro de la Kulturdepartemento, S-ro Amauri Vasconcelos; Direktorino de Ina Departamento, S-ino Lucia Lemos.

La gazeto “Mercurio”, organo de la lernantoj de Komerca Teknika Lernejo “Epitácio Pessoa” de la sama ĉefurbo posedas sektion pri Esperanto, direktata de S-ro Lemos Diniz.

La leginda revuo “Mocidade” (Juneco), kies direktoroj estas S-ro Lemos Diniz kaj S-ro Aderbal Cavalcante, aldonis al siaj paĝoj fakon pri Esperanto, bonege redaktitan de nia samideano Haroldo Leite Pinto.

MINAS GERAIS — *Belo Horizonte* — Oni elektis novan estraron por “Kristana Esperanto-Klubo”. Ĝi konsistas el la jenaj personoj: Honora Prezidanto, S-ro Dilermando Teixeira; Prezidanto, S-ro Jarvis Vieira Campos; Vic-Prezidanto, S-ro Abilio P. Campos; 1a Sekretario, D-rino Helena Kiss; 2a Sekretario, F-ino Josefina Schembrj; 1a Kasisto, F-ino Helena Pinto; 2a Kasisto, S-ro Rain Cristoff Raeff.

vis la karmemoran nomon de “Couto Fernandes”, memorhonore de Doktoro Alberto Couto Fernandes, prezidinto de “Brazila Ligo Esperantista” kaj unu el la plej grandaj apostoloj de Nia Paca Afero en la mondo.

En la sidejo de Grupo “Spiritisma Junularo”, oni inaŭguris novan kurson de Esperanto, kiu, honore al D-ro A. Couto Fernandes, ricevis lian nomon. Antaŭ la inauguro, S-ro Ismael Gomes Braga faris paroladon pri “Kristanismo kaj Esperanto”, dediĉitan al la junularo de tiu ĉefurbo.

“Montara Bulteno” — Kun agrabla aspekto kaj legindaĵoj, aperis tiu bulteno, organo de Esperanto-Klubo Azeredo Coutinho, de Belo Horizonte. La kovrilo de la dua numero kavas interesan bildon: la konturo geografia de ŝtato Minas Gerais, interne de la kvinpinta verda stelo.

Uberaba — Oni fondis “Uberaba Esperanta-Klubon”, kies elektita estraro por 1947 estas: Prezidanto, Major Nestor Cravo; Vic-Prezidanto, Rui Medina Coeli; Generala Sekretario, Prof. Raimundo Rodrigues; 1a Sekretario, Prof. Clever Novais; 2a Sekretario, D-ro Odilon Rodrigues; 1a Kasisto, José França Junior; 2a Kasisto, F-ino Elza Guido; Bibliotekisto, Lirio de Faria; Direktoro por propagando, Prof. Alceu de Souza Novaes; Direktorino por la virina sekcio, Dalva Guido Fernandes; Kontrola Konsilantaro, Vergilio Victor da Silva, Clarkson de Castro Silva, Mario Neiva e Delmira Rodrigues.

Ciuj anoj de “Uberaba Esperanto-Klubo”, laŭ ĝiaj statutoj, ankaŭ estas anoj de “Brazila Ligo Esperantista” kaj “Internacia Esperanto Ligo”.

La gazeto “O Triangulo”, de la sama urbo, publikigis propagandan artikolon iom ŝercan, verkitan de nia samideano profesoro Alceu Novaes.

RIO DE JANEIRO — La nova estraro de Associação Esperantista do Rio de Janeiro, por 1947, konsistas el — Sinjoroj:

Prezidanto, F. Doblas Filho; Ĝenerala Sekretario, D. Pereira de Souza; 1a Sekretario, M. Avela de Souza; 2a Sekretario, O. Silva Lopes; 1a Kasisto, M. Barbosa de Mello; Help-Kasisto, M. F. da Silva Sobrinho; Bibliotekisto, J. Cosenza.

Departementoj:

Disvastiga, Sylla M. Chaves; Lerniga, Nelson P. de Souza; Kultura, Laszlo Zinner; Jura, Ilka Duque Estrada; Virina, Elza F. Faria; Ekskursa, Olivio C. Pinto.

“Informilo”, bulteno de Associação Esperantista do Rio de Janeiro, ŝanĝiĝis en “Rio Esperantista”, kies unua numeron ni ricevis. Ĝi celas precipe esti ilo inter la Asocio kaj ĝiaj anoj, kaj perfektigilo por novaj esperantistoj.

ESPERANTAJ KURSOJ — Brazila Klubo Esperanto inaŭguris novan kurson, kies direktanto estas prof. Octavio Vianna Peixoto. Antaŭ la inaŭguro leciono, S-ro A. José Vaz, Vic-Prezidanto de Brazila Klubo Esperanto kaj ĉefdelegito de I. E. L. faris paroladon pri Esperanto, ilo por la kulturo kaj interkompreniĝo.

Rekomenciĝis ankaŭ la kursoj en Federação Espirita Brasileira, sub la gvido de prof. Aldino de Freitas; Esperanto Klubo de Kristana Asocio de Junuloj, gvidata de prof. Roberto das Neves, kaj Associação Esperantista do Rio de Janeiro, sub la gvido de prof. Delio Pereira de Souza.

—:—

En la 22a de Aprilo, kiam pasis la 1a jaro post la morto de D-ro A. Couto Fernandes, la esperantistoj, memore de sia kara mortinta ĉefo, vizitis lian tombon, ĉe tombejo São João Batista.

SÃO PAULO — *São Paulo* — Aliĝis al la XIa Brazila Kongreso de Esperanto, kiel Kontribuanta Institucio, Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística.

“Federação das Industrias do Estado de São Paulo”, konsiderante la noblan celon de la esperantista movado — la interproksimiĝo de la popoloj, pere de internacia helpa lingvo, decidis apogi la XIan Brazilan Kongreson de Esperanto.

Pastro Narciso Irala, S. J., esperantisto, faris la 12an de Aprilo sian lastan paroladon en Brazilo, en la nova sidejo de “São Paulo Esperanta Klubo”, ĉe domo America (eks-Martinelli), 21a etaĝo, ĉambro 2123. La parolado temis pri “O coração da China” (La koro de Ĉinujo), kun projekcioj de filmoj pri Ĉinujo, kaj klarigoj portugale kaj Esperante.

Kursoj pri Esperanto — Universidade Popular “Presidente Roosevelt” rekomencis siajn kursojn, inter ili la Esperantan, gvidata de prof. Oswaldo Leite de Moraes, prezidanto de São Paulo Esperanto-Klubo.

Du novajn kursojn faras S.P.E.K. en sia nova sidejo, sub la gvidado de profesoroj Newton Ceratti kaj Otto Kuhne.

Oni organizis dimanĉan senpagan kurson, por gelaboristoj, en strato Guarulhos, 115 — Penha, São Paulo.

La Organiza Komitato de 11a Brazila Kongreso intencas eldoni broŝureton memorigan, dediĉante specialan ĉapi-

tron al la memoro de la esperantistoj mortintaj post la 10a Kongreso.

Laŭ la dekreto 16675, de 16-12-1946, la Registaro de Ŝtato São Paulo donis la subvencio de 20.000,00 Kruzeiroj al São Paulo Esperanto-Klubo.

Rio Claro — La ĉiutaga gazeto "Cidade de Rio Claro", el la urbo Rio Claro, presigis serion da artikoloj pri la lingvo internacia kaj Esperanto. Klere verkitaĵ de nia samideano Elídio Taveiros, tiuj artikoloj estas bonega propagandilo.

La plej gravaj gazetoj de ĉefurbo São Paulo daŭrigas konigi al aliaj legantoj la precipajn sciigojn pri la esperantista movado kaj la XIa Kongreso.

SANTA CATARINA — *Florianópolis* — Jen estas la nova estraro elektita por direkti "Esperantistan Klubon de Florianópolis" dum 1947a jaro:

Prezidanto, S-ro Pedro de Lima Brenneisen; Sekretario, S-ro Eugenio Doin Vieira; Kasisto, S-ro Washington Luiz do Vale Pereira.

La ordinara kunsido de 18-12-947 ankaŭ kreis, por plivigli la agadon de la klubo, Kulturan Departementon, kies direktoro estas S-ro Giovanni P. Faraco, kaj gvidantoj de la fakoj — kursoj, propagando, materialo, biblioteko kaj sociaj kunvenoj estas F-ino Helena N. Spyrides, S-roj Ari Kardec de Melo, Gilberto Doin Vieira, Dilton do Vale Pereira kaj Osvaldo Melo Filho.

INSTITUTO BRASILEIRO DE GEOGRAFIA E ESTATISTICA

O Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, pelo seu Directorio Regional, acaba de enviar aos organizadores do XI Congresso Brasileiro de Esperanto, o seguinte officio:

"Considerando que o XI Congresso Brasileiro de Esperanto visa, com a difusão desse idioma, estreitar as relações entre os povos e por conseguinte aumentar as suas relações culturais e economicas, para melhor entendimento e bem comum:

Considerando que o Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística já adotou o Esperanto como sua lingua auxiliar e que essa providência muito concorre para a divulgação de conhecimentos geográficos e científicos em geral;

Considerando que este Directorio Regional tem sempre hipotecado o seu apoio aos certames científicos e culturais e que, pela resolução 48 de 12 de março de 1945, aderiu ao X Congresso de Esperanto, resolve: Artigo

XI Congresso Brasileiro de Esperanto

LISTA DE CONGRESSISTAS

- | | |
|--|---|
| 1 — S. PAULO ESPERANTA KLUBO, S. Paulo. | 25 — JOSÉ POLEDNA, São Paulo. |
| 2 — BRAZILA LIGO ESPERANTISTA, Rio de Janeiro. | 26 — CARLOS POLEDNA, São Paulo. |
| 3 — ALCINDO BRITO, S. Paulo. | 27 — CAPITÃO GORDIANO PEREIRA, São Paulo. |
| 4 — OSWALDO LEITE DE MORAES, S. Paulo. | 28 — EUGENIA DE VASCONCELOS, São Paulo. |
| 5 — RENE' VENTURA SALLES, Suzano | 29 — WALDEMAR MARCZINSKI, S. Paulo. |
| 6 — GERALDO DE AZEVEDO, S. Paulo. | 30 — JOSÉ DA SILVA FOLGOSA, São Paulo. |
| 7 — AMÉLIA LEVY, S. Paulo. | 31 — LIBERAL FRANCISCO CARPINI, Loreto, Est. S. Paulo. |
| 8 — AZÁLIA MACHADO DIAS, S. Paulo | 32 — DEOCLECIO LIMA VERDE, dr. Limoeiro do Norte, Ceará. |
| 9 — OLINDO LEONARDI BALDIN, S. Paulo. | 33 — GRUPO ESPERANTISTA DE LIMOEIRO DO NORTE, Limoeiro do Norte, Ceará. |
| 10 — JOSÉ REGANATI, S. Paulo. | 34 — GUIOMAR SANTIAGO LIMA VERDE, Limoeiro do Norte, Ceará. |
| 11 — TUFFY RESEC CHOUERI, S. Paulo. | 35 — AIMÉE B. SALGADO, S. Paulo. |
| 12 — NEWTON CERATTI, S. Paulo. | 36 — SEBASTIÃO ALMEIDA OLIVEIRA, Tanabi, Est. S. Paulo. |
| 13 — GENNY CERATTI, S. Paulo. | |
| 14 — JAQUELIN R. G. SANCHEZ, São Paulo. | |
| 15 — MARIO RODRIGUES MONTEIRO, S. Paulo. | |



São Paulo — Vidaĵo de "Parque Anhangabaú", ĉe la koro de l'urbo

- | | |
|---|--|
| 16 — ABILIO JOSÉ RODRIGUES, São Paulo. | 37 — BRAZILA KLUBO ESPERANTO, Rio de Janeiro. |
| 17 — LEON SABRA, S. Paulo. | 38 — A. CAETANO COUTINHO, Rio de Janeiro. |
| 18 — TENENTE GERALDO BRITO, São Paulo. | 39 — MARIA DO AMARAL MALHEIRO, Rio de Janeiro. |
| 19 — CINALDO BRITO, S. Paulo. | 40 — ANTONIO JOSÉ VAZ, Rio de Janeiro |
| 20 — CORONEL SALVADOR DE MOYA, S. Paulo. | 42 — GETULIO SOARES DE ARAÚJO, Rio de Janeiro. |
| 21 — UNIÃO ESPIRITA MINEIRA, Belo Horizonte. | 43 — DEBORA DO AMARAL MALHEIRO, Rio de Janeiro. |
| 22 — ALLAN KARDEC AFONSO COSTA, Belo Horizonte. | 44 — ROSA C. A. MALHEIRO, Rio de Janeiro. |
| 23 — DIVA JAIME COSTA, Belo Horizonte. | 45 — ESPERANTO-KLUBO "AZEREDO COUTINHO", Belo Horizonte. |
| 24 — GERALDO PEDRO PINTO, Belo Horizonte. | 46 — LUIZ DE AZEREDO COUTINHO, Belo Horizonte. |
| | 47 — MARIA SALOME COUTINHO, Belo Horizonte. |
| | 48 — LUIZA MARIA DE AZEREDO COUTINHO, Belo Horizonte. |
| | 49 — JARVIS VIEIRA CAMPOS, Belo Horizonte. |

único — Aderir ao XI Congresso Brasileiro de Esperanto, concorrendo com a cota de Cr\$ 100,00 como "Instituição Contribuinte".

- 50 — SALVADOR SCHEMBRI, Belo Horizonte.
- 51 — ROSARIA MANZONI SCHEMBRI, Belo Horizonte.
- 52 — LEONARDA SCHEMBRI, Belo Horizonte.
- 53 — JOSEFINA SCHEMBRI, Belo Horizonte.
- 54 — MISAEL ALVES MENDES, Belo Horizonte.
- 55 — GABRIEL AUGUSTO DE GOUVEA, Belo Horizonte.
- 56 — MARIA JOSE DE AZEREDO PENA, Belo Horizonte.
- 57 — R. C. RAFF, Belo Horizonte.
- 58 — A. C. CAMPOS, Belo Horizonte.
- 59 — HELENA KISS, Belo Horizonte.
- 60 — ALONSO TEIXEIRA, Belo Horizonte.
- 61 — MARIA DAS DORES TEIXEIRA, Belo Horizonte.
- 62 — DILERMANDO TEIXEIRA, Belo Horizonte.
- 63 — ARISTOTELES JUVENAL DE FARIA ALVIM, Belo Horizonte.
- 64 — WALDOMIRO ANDRADE, Belo Horizonte.
- 65 — KRISTANA ESPERANTO-KLUBO, Belo Horizonte.
- 66 — WILSON VEADO, dr., Belo Horizonte.
- 67 — LUIZA VENTURA VEADO, Belo Horizonte.
- 68 — RICARDO WAGNER AD-VINCULA VEADO, menor, Belo Horizonte.
- 69 — FIRMINO WHITAKER, dr., São Paulo.
- 70 — HALDSON CESAR BARBOSA, dr., São Paulo.
- 71 — MAURO DE TOLEDO PIZA, dr., S. Paulo.
- 72 — VICENTE DE PAULA DIAS, São Paulo.
- 73 — JOSE FRANCISCO SAMPAIO, Salvador, Bahia.
- 74 — ANTONIO BRITTO DA SILVA, Salvador, Bahia.
- 75 — SYNVAL SANTOS REIS, Salvador, Bahia.
- 76 — BRAULIO DE ALMEIDA QUEIROZ, Salvador, Bahia.
- 77 — OLIVIO WANDERLEY FERREIRA, Salvador, Bahia.
- 78 — ASSOCIAÇÃO POTIGUAR DE ESPERANTO, Natal, R. G. do Norte, Pernambuco.
- 79 — ALDO AZEVEDO MELLO, Recife, Pernambuco.
- 80 — ALCINDO DE SOUZA GUIMARÃES, Recife, Pernambuco.
- 81 — MANOEL GONÇALVES D'AZEVEDO, Recife, Pernambuco.
- 82 — RAUL MARTINS DE LEMOS, Recife, Pernambuco.
- 83 — GASTÃO MOREIRA, Recife, Pernambuco.
- 84 — JORGE MAIA, Recife, Pernambuco.
- 85 — DURVAL MACEDO FRANÇA, Recife, Pernambuco.
- 86 — ARISTIDES SOUSA BELLO, Curitiba, Paraná.
- 87 — J. M. DE FARIA NETTO, Curitiba, Paran.
- 88 — LEÃO ZEIGELBOIM, Curitiba, Paraná.
- 89 — WENCESLAU TEIXEIRA, Curitiba, Paraná.
- 90 — JOSE DA MOTA RIBEIRO, Curitiba, Paraná.
- 91 — F. SINKE FERREIRA, dr., Curitiba, Paraná.
- 92 — KYELCE A. CORREIA, dr., Curitiba, Paraná.
- 93 — ATTILIO B. RIBAS, Curitiba, Paraná.
- 94 — JOÃO F. GONÇALVES VICENTE, Londrina, Paraná.
- 95 — VICTOR MACHADO, Ponta Grossa, Paraná.
- 96 — MERCEDES BRAVO, São Paulo.
- 97 — S-RO NOBUO SAHEQUI, S. Paulo.
- 98 — S-RINO HENRIQUETA VENTURA SALLES, Suzano, Est. de S. Paulo.
- 99 — F-INO NAIR VENTURA SALLES, Suzano, Estado de São Paulo
- 100 — S-RO OTTO KUHNE, São Paulo.
- 101 — S-RO MANUEL J. FERNANDES, São Paulo.
- 102 — S-RO LUIZ BRAZ SALLES, São Paulo.
- 103 — S-RO ABEL BRAZ SALLES, São Paulo.
- 104 — F-INO IRACEMA LOPES RIBEIRO
- 105 — GRUPO ESPERANTISTA DA FEDERAÇÃO ESPIRITA DO ESTADO DE S. PAULO, S. Paulo.
- 106 — S-RO GILBERTO MARCHETTI MACHADO, S. Paulo.
- 107 — DIRETORIO REGIONAL DE GEOGRAFIA NO ESTADO DE S. PAULO, S. Paulo.
- 108 — S-RO PAULINO SANTIAGO, Macaé, Alagoas.
- 109 — F-INO MARINA DE BARROS PEREIRA, Rio de Janeiro.
- 110 — S-RO ADOLPHO LUCULO, Rio de Janeiro.
- 111 — S-RO ANTONIO GALVAO TEIXEIRA, Rio de Janeiro.
- 112 — S-RO ANTONIO CAETANO FERREIRA, Rio de Janeiro.
- 113 — S-RO REYNALDO CRUZ SANTOS, Rio de Janeiro.
- 114 — S-RO EUSTAQUIO DUARTE, Rio de Janeiro.
- 115 — F-INO MARIA MARGARIDA WOCHNIK, S. Paulo.
- 116 — S-RO JOSEF ISRAEL CAHN, São Paulo.
- 117 — S-RO ADRIANO S. T. CARVALHO, S. Paulo.
- 118 — S-RO JOAO CERATTI, São Paulo.
- 119 — S-RO NICOLA SUZANO, São Paulo.
- 120 — F-INO JOAQUINA RAMOS PRADO, São Paulo.
- 121 — S-RO RUBENS ARIZA MARTIN, São Paulo.
- 122 — F-INO LINDOMAR ARIZA MARTIN, São Paulo.
- 123 — S-RO JOSE ARIZA PEÑA, São Paulo.
- 124 — S-RO JOSE DOMINGUES DE MORAES, São Paulo.
- 125 — S-RO FLAVIO GOUVEA, São Paulo.
- 126 — S-RO JACQUES EISENHUT, São Paulo.
- 127 — D-RO UMBERTO SALOMONE, São Paulo.
- 128 — "COUTO FERNANDES" ESPERANTO KLUBO, Cravinhos, Estado de São Paulo.
- 129 — S-RO DANTE PALAGI FILHO, São Paulo.
- 130 — F-INO JUDITH HENSEL, S. Paulo.
- 131 — S-RO ELIDIO TAVEIROS, Rio Claro, Estado de São Paulo.
- 132 — S-RO LUIZ L. MARINO, S. Paulo.
- 133 — ESCOLA DE COMERCIO "ALVARES PENTEADO", São Paulo.
- 134 — S-RO RENATO CARDOSO MIRANDA, Teófilo Otoni, Minas Gerais.
- 135 — S-RO TITO CARDOSO MIRANDA, Teófilo Otoni, Minas Gerais.
- 136 — S-RO VICTOR MINJERO, S. Paulo.

ANONCOJ

Posedu la brazilajn memorigajn poŝtmarkojn de Esperanto. Sendu 15 kruzejrojn al S-ro O. Ferreira. Adreso: Rua Capitão Cavalcante, 308, São Paulo — Brasil.

—:—

SVEDLANDO — Globa Klubo, Box 9, Umea 2. Deziras korespondi kun la tuta mondo pri lingvoj, vojaĝoj, landoj kaj popoloj, literaturo, florkulturaĵo, k. t. p. kaj interŝanĝi il. pk., pm., ĵurnalojn, librojn, floresemojn, k. t. p.

Dicionário de Bolso

Esperanto-Português

de A. Couto Fernandes (com as terminações, afixos e radicais oficiais do Esperanto) 4.^a edição do RADIKARO ESPERANTO-PORTUGALA

Brochado..... Cr\$ 8,00

TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE BRAZILIO:

Originaloj el la "Brazila Revuo de Geografio" tradukitaj de sep membroj de B. L. E. eldonita de B. I. G. S. Formato 27 x 19. Ĝi enhavas 152 paĝojn kaj 36 ilustraĵojn.

Prezo:

Broŝ Cr\$ 20,00
Kart Cr\$ 35,00
Bind Cr\$ 50,00

Eksterlande:

Broŝ 16 respondkuponoj
Kart..... 30 respondkuponoj
Bind..... 48 respondkuponoj
aŭ egalvaloro

SANTOS DUMONT — LA AERPIONIRO

Originalo de Prof. A. Brigole. Ilustrita 82paĝa libreto kun 21 ilustraĵoj kaj arta kovrilo. Krom la portreto de Santos Dumont, de ties patro kaj de la aŭtoro, ĝi enhavas tiun de Archdeacon, granda amiko de Santos Dumont kaj Prez, de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto.

Cr\$ 5,00 aŭ 6 respondkuponoj.

LIVROS COM PEQUENOS DEFEITOS

Dicionário Port.-Esp. (enc.) Cr\$ 30,00
Dicionário Esp.-Port. (cart.) Cr\$ 25,00
Ama Stelaro..... Cr\$ 2,00
Esperanto — Série Pedro II Cr\$ 1,50

Mendoj al BRAZILA LIGO ESPERANTO Praça da República, 54 — Rio de Janeiro Brazilo.

- 137 — F-INO ARTEMISA VIDAL DE ARAUJO, Recife, Pernambuco.
- 138 — D-RO ROMULO ZEBALLOS MORALES, Flórida, Uruguai.
- 139 — PROF. MANUEL FERNANDEZ MENENDEZ, Montevideo, Uruguai.
- 140 — S-RO VICTOR LUIS CAO, Montevideo, Uruguai.

(Continua no proximo número)

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

B. L. E. faris en la 25a de januaro sian unuan ordinaran kunsidon de 1947, en kiu partoprenis la delegitoj de preskaŭ ĉiuj filitaj grupoj.

La prezidanto prezentis la raporton pri 1946, kiu komence honoris la memoron de la kara prezidinto, D-ro Alberto Couto Fernandes, kaj poste okupiĝis pri diversaj aferoj: la apogo donita al B. L. E. de la publikaj popoloj, de gravaj institucioj, de la gazetaro kaj de radistacioj; la propagando, uzado kaj kursoj de Esperanto; la organizado de brazila antologio kaj de disko-kolekto pri esperanta kanto kaj deklamado; la plibonigoj bezonataj de "O Brasil Esperantista"; la eldonado de lernolibroj; la venontaj Kongresoj (XXXII Universala, IV Argentina, XI Brazila); k. t. p. La raporto estis unuanime aprobita, same kiel la kontoj, kiuj ni publikigas en tiu ĉi numero.

Oni ankaŭ aprobis la raporton de la komisiono pri reformo de la statuto, kiu opiniis por la prokrasto de la reformo. Fine oni akrame reelektis D-ron Carlos Domingues kiel delegiton de B. L. E. ĉe la Komitato de I. E. L.

LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA

Balancete referente ao ano de 1946

	Cr\$	Cr\$
Saldo de 1945	661,30	
Cotas de sócios	15.207,40	
Subvenção do Ministério de Educação e Saúde	5.060,00	
Cursos por correspondência, atestados e diplomas	1.802,50	
Livros, revistas e cartões postais	12.445,30	
Fotografias	200,00	
Juros bancários	156,50	
XI Congresso Brasileiro de Esperanto	285,00	
Donativos	73,10	
Selos e Telegramas		1.102,10
Material de Expediente		4.273,40
Impressão de "O Brasil Esperantista"		6.486,30
Despesas miúdas		2.098,80
Gratificações por serviços prestados		4.510,00
Fotografias		560,00
Cursos por correspondência		185,60
Cotas "Internacia Esperanto-Ligo"		9.281,40
Comissões		37,40
Edição de livros		6.547,00
Saldo para 1947		749,10
	35.831,10	35.831,10

Rio de Janeiro, 31 de dezembro de 1946.

(Ass.) Délio Pereira de Souza
Tesoureiro

MERIKO

Mi ĉiam kredis, ke en nia Ameriko ne estas eble paroli pri diversaj patrujoj, sed nur pri unu granda kaj sola patrujo. Mi ĉiam kredis, ke se estas alta la ideo de patrujo, esprimo de ĉio plej funda, ekzistanta en la sentemo de l' homo: amo al la lando, poezio de rememorado, ravo de goro, esperoj je senmorteo, en Ameriko, pli ol en iu ajn alia loko, ne malhelpante tiun ideon, oni devas ĝin plinobligi, plivastigi: ĝin purigi de ĉio mizera kaj negativa, kaj ĝin superbeligi per la virto de ĉio pozitiva kaj fekunda, kiun tiu ideo enhavas: oni devas starigi super la patrujo nacia la Patrujon amerikan, kaj akceli la venon de tiu tago, kiam la hodiaŭaj infanoj kaj estontaj viroj kaj virinoj, pridemandataj, kiu estas la nomo de ilia patrujo, ne respondos per la nomo Brazilo, nek per la nomo Ĉilio, nek per la nomo Meksiko, sed respondu per la nomo Ameriko.

Ĉia internacia amerika politiko ne direktata al tiu celo, al tiu estonteco kaj ne al ĝustiĝita al la preparo de tiu harmonio, estas vans kaj erara politiko.

JOSE' ENRIQUE RODO'
(Urugvaja verkisto)

"O INSTITUTO BRASILEIRO DE GEOGRAFIA E ESTATISTICA E O ESPERANTO"

I. B. G. E. (Brazilo Instituto de Geografio kaj Statistiko) ĵus publikigis valoran verkon pri nia lingvo — "O Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística e o Esperanto". Ĝi estas 180-paĝa broŝuro, presita sur luksa papero, kun la formato 27x19, kies enhavo estas: "La Brazilo Statistiko kaj la Esperanto-Movado", "Prece do Homem Livre (Franklin Delano Roosevelt)", "O Esperanto no Brasil (M. A. Teixeira de Freitas)", "Antaŭparolo de l' bulteno memoriga de la Ekspozicio Nacia de 1908", "Que é o Esperanto?", "Termos estatísticos em Esperanto (Malgranda statistika terminaro)", "Décimo Congresso Brasileiro de Esperanto" "Alberto Couto Fernandes"; "Mortinha Gvidanto (Waldemar Lopes)".

Tiu libro, kies gravecon ni devas reliefi pro tio ke ĝi estas volumo de oficiala serio, estas dediĉita kaj donacita al la IV-a Argentina Kongreso de Esperanto kunveninta en Buenos Aires tiun ĉi jaron.

I. B. G. E. eldonis ankaŭ kun la sama memoriga celo belan sepikoloran bildon de Zamenhof en eleganta kovrilo.

Pro tiu nova grandvalora kontribuado de I. B. G. E. al nia afero ni dankas ĝian direkcion, speciale la ĝeneralan sekretario D-ron Teixeira de Freitas, kaj ni gratulas niajn samideanojn.

(Daŭriĝo de paĝo 2-A)

devas prezenti al niaj samideanoj de la du progresemaj landoj miajn tutkorajn dankojn pro ilia afableco. Mi loĝis ĉe esperantista familio kaj ĉiam estis akompanata de samideanoj en promonadoj kaj vizitoj. Mi eĉ ne konsciis, ke mi estis aliĝande, ĉar vere mi restis ĉiam interne de Esperantujo, malgraŭ la politikaj landlimoj. Nia kulturlingvo restis ĉiam la sama, kun la samaj kutimoj, la sama literaturo, la samaj poetoj kaj verkistoj, la samaj kantoj kaj ŝercoj. La mondo ankoraŭ ne povas kompreni la ekziston de tia kulturo, kia restas en la limoj de Esperantujo, tiu estas, sur nia malgranda planedo, la Esperanta mondkulturo.

Ismael Gomes Braga

Brazilo Klubo Esperanto

Brazilo Klubo Esperanto (Rio de Janeiro) kolektis en sia 40jara ekzistado la plej riĉan esperantan libron en Brazilo. Tiu biblioteko enhavas maloftaĵojn de la unuaj tempoj same kiel preskaŭ ĉiujn modernajn verkojn de nia literaturo.

Antaŭ kelka tempo la estraro de B.K.E. decidis plibonigi ĝian bibliotekon per la akiro de pliaj libroj, bindigo de ĉiuj verkoj kaj perfekta katalogado. Oni rebindis multajn volumojn kaj jam bindis ĉirkaŭ milbroŝurojn; kaj oni finas la preparon de du slipaj katalogoj: unu laŭ aŭtoroj, la alia laŭ temoj. Poste oni presigos eliraĵojn de la katalogo, kiu taŭgos kiel propagandilo de Esperanto.

Sciiginte pri la reformo de la biblioteko de B.K.E., kelkaj sindonaj samideanoj faris valorajn donacojn per mono, libroj kaj biblioteka materialo. Jen la nomoj de la donacintoj, al kiuj B.K.E. pere de nia gazeto rediras sian varman dankon:

S-ro A. Caetano Coutinho
D-ro A. Couto Fernandes
D-ro A. Juvenal de Faria Alvim -
F-inoj Amaral Malheiro
D-ro Borja Portela
D-ro Carlos Domingues
S-ro Getúlio Soares de Araújo
F-ino Iraní Baggi de Araújo
S-ro Ismael Gomes Braga
D-ro J. X. Marques do Couto Jor.
D-ro Luiz de Azeredo Coutinho
D-ro L. Porto Carreiro Neto
S-ro Manoel Jorge Gaio
S-ro Nikolao Ladany
S-ro Obdego Augusto
S-ro Sebastião Almeida Oliveira